# GAZAO EN LA KORO

*(Memore al la Palestina poeto Refaat Alareer, murdita kiel 44-jarulo, kune kun 6 membroj de sia familio, kadre de la Israela bombardado okazinta la 7an de decembro 2023)*

*Se mi mortu*
*vi vivu*
*por rakonti mian historion*

REFAAT ALAREER

*Doloras la karno kaj bolas la sango*

antaŭ la ĉiutaga genocido
al masakrata popolo Palestina.
Gaza-stri' estas nun plia Aŭŝvico,
kun tricent sesdek kvin
kvadrataj kilometroj da areo,
jam pli ol sepdek jarojn
da *apartheid*, okupacio kaj ekstermo
fare de, ve!, la Cionisma Ŝtato.
Gaza-stri' estas nun nova versio
de la pentraĵ' *Gernika*, de Picasso,
jam de l' fajra novembro pasintjara.
Ho, ve, kiel terura novembro pasintjara!

*Doloras la karno kaj bolas la sango*.

Jen mia panjo ploras senkonsola.
Kaj jen mia filino
mortadas de malsato kaj soifo.
Kaj jen mia nepeto disrompita
de bombo detruinta lian bazan lernejon.
Kaj jen mia nepino hurladas ĉe l' ruinoj
de l' hospitalo, kie, sena je siaj kruroj,
kiujn ŝi perdis ĉe bombad' pli frua,
ŝi estis kuracata,
preskaŭe sen rimedoj kaj sen elektra lumo,

de doktoroj penantaj savi ŝin.
Kia kolero, ve, kaj kia honto!

*Doloras la karno kaj bolas la sango.*

Sed la Ter', nesentema, plue giras.
Kaj ne ekerupcias la vulkanoj.
Kaj ne ŝprucas cunamo
bona por forbalai
tiom da maljustaĵoj.
Kaj de la dekstra man' de la dresita
Statu' de la Libero en Nov-Jorko
ne defalas la torĉo grandahonte.
Kia kolero, ve, kaj kia honto!

*Doloras la karno kaj bolas la sango.*

Sed la tutmonda krio el la protesto-maro
kresĉendas, kaj Usono,
mentoro de la Ŝtato Cionisma,
petas ĝin, ne ke ĝi ne plu mortigu,
sed ke ĝi jam mortigu iom malpli.
Kaj Usono de ĝi aĉetas armojn
kun pruvita efiko kontraŭ palestinanojn.
Kaj al ĝi vendas rafinitajn armojn,
ke ĝi palestinanojn murdu plue.
Kaj l' ekstermado pluas,
la genocido pluas
kaj la okupaci' de Palestino.

*Doloras la karno kaj bolas la sango.*

Ĉar ne ekzistas landoj promesitaj de dioj.
Ne ekzistas popoloj elektitaj de dioj.
Ne ekzistas – diable,
vi ĉiuj devus jam ĉi tion scii! –…
ja ne ekzistas dioj!!!

*Miguel Fernández*